



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Julio 2016 n-ro: 7



## Saluton!

Finfine somero alvenis !  
Bonan someron al ĉiuj !

Kursoj paŭzis kaj ili epsereble rekomencos en oktobro  
kiam ĉiuj revenos el la someraj domoj.

La Esperanto konkurso kiun organizis Utku Gürdal  
jam finiĝis.

La 101-a UK kiu okazos en Nitra urbo de Slovakio  
alproksimiĝas.

En ĉi tiu numero, Cecile Anda, nia kara amikino kaj  
partoprenanto de la 9-a Mezorianta Kunveno ĉi aprile,  
verkis siajn travivaĵojn dum sia vojaĝo en Turkujo.

Paule Burnel el Francujo verkis por ni pri kiel kaj kial  
ŝi esperantiĝis.

Nia junia numero estas 20 paĝojn longa.  
**Bonan legadon al ĉiuj !**

## Merhaba !

Nihayet yaz geldi!  
Herkesi iyi yazlar!

Kurslara ara verildi, ve kismetse Ekim ayında herkes  
yazlık evlerinden döndüğünde yeniden başlayacağız.

Utku Gürdal'ın düzenlediği Esperanto yarışması sona  
erdi.

Nitra Slovakya'da gerçekleşecek 101. UK'nin tarihi  
yaklaşmakta.

Bu sayımızda, Cecile Anda, 9. Ortadoğu toplantısına  
katılan arkadaşımız Türkiye'ye yaptığı seyahatini ve  
yaşadıklarını kaleme aldı.

Fransa'dan Paule Burnel nasıl ve neden Esperanto  
öğrendiğini bizlere yazdı.

Haziran sayımız 20 sayfa uzunluğunda.  
**Herkesi iyi okumalar!**



## TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com


Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Saluton!	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Rezulto de la Esperanto Konkurso	2
101-a UK en Nitra Slovakio	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj el geamikoj	4
Kiel kaj kial mi esperantiĝis	4
Legajo "Zepo la Zebro"	5
Brazilano plantas 18 mil arbojn	6
Ŝercoj	7
Krucvort-Enigmo	7
Poemoej de Kalman Kalocsay	8
Impresoj el Turkio de Cecile Anda	9
La unua Vegan-amika urbo en la mondo	11
Mallonga Historio de filozofio (Epikteto, Cicerono, Seneko)	12
La junaj detektivoj (ĉap.2)	13
Afrika Kongreso de Esperanto	14
Internacia Tago de Familio	15
Gramatiko-Kritiko	16
Kuiru kun mi	17
Esperanto Kurso (7)	18
Malfermo	20

## Kursoj



Pro somero la kursoj nun estas en paŭzo.

Ĝis oktobro !

## Ŝtuparo al sukceso



## Rezulto de la Esperanto Konkurso

Esperanto yarışmasında, sonuna kadar liderlik mücadelesi veren ilk iki sıradaki Ömer Türkgeldi ve Rufat Abdulla ödüle hak kazandı. Kazananlara Tutmonda Esperanto Futbala Asocio - TEFA'dan birer forma hediye edilecek. Ayrıca kura çekimi sonunda 1 yarışmacı daha ödüle hak kazanacak.



## 101-a UK en Nitra Slovakio



<https://www.facebook.com/uk2016/videos/1733715506841361/>

La urbo Nitro vere kunlaboras kaj helpas pri informado pri la UK 2016 kaj Esperanto. Jam nun oni trovos en la urbocetro afiŝegojn pri la kongreso en la slovakia kaj Esperanto. Ankaŭ la "trajneto" kiu dum la tuta alventago, la 23-a de julio, senpage portados kongresanojn de la stacidomo al la kongresejo reklamas jam Esperanton.

Ankaŭ vi povas helpi varbi kaj reklami UK-n, ekzemple uzante reklamrubandojn (troveblajn ĉe: <http://www.nitra2016.sk/elsxutejo/>) en viaj blogoj/retejoj.

**Indas partopreni!**

## Ni atendas leterojn de geamikojn



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

## Esperanto-Sumoo



En la maja Esperanto Sumoo partoprenis 276 homoj el 26 landoj kaj.

Perfektaj venkintoj (15 venkoj) estis 219 el la 276 partoprenanto (79,34%)

Kvanto de legitaj paĝoj estis pli ol 16 000 paĝoj. Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la sumoo.

La nombro de la maja sumoo denove saltis al 276 pro tio, ke

- 1) koreoj multiĝis de 29 partoprenintoj en marto al 42 partoprenantoj
- 2) 12 svisaj gelernantoj partoprenis.

La nombro de landoj ne multiĝis: 29 en januaro, 26 en marto kaj 26 en majo.

La plej bedaŭrindaj aferoj estis, ke neniu partoprenis el Afriko kaj Oceanio. El Oceanio neniu partoprenis ekde la komenco de la sumoo. El Norda Ameriko nur unu partoprenis. Ni devas igi tiun ĉi sumoo-n vere internacia.

Entute 9 recenzoj kaj unu opinio venis pri la legitaj libroj (en marto 9 kaj en januaro 19).

La Julia sumoo okazos ekde la 3a de julio ĝis la 10a de julio dum 8 tagoj ĉar en julio jam komenciĝos diversaj aranĝoj en Esperantujo, do ni mallongigis la periodon en 8 tagojn.

**Legu pli ĉe:**

<http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/>

## UEA



### KOMITATANOJ B SEN BALOTOJ

Gazetaraj Komunikoj de UEA N-ro 616

Estas jam konataj la nomoj de la komitatanoj B kiuj ekoficos en la 101-a Universala Kongreso de Esperanto. El la ok personoj kiuj kandidatiĝis por la ses lokoj, intertempe du retiris siajn dokumentojn. Tio signifas ke la ceteraj estas rekte elektitaj al la Komitato, la supera organo de la Asocio.

En la jaroj 2016-2019 la individuajn membrojn en la Komitato reprezentos Emílio Carlos Vaz Cid (Brazilo), Mark Fettes (Kanado), Maritza Gutiérrez González (Kubo), Stefan MacGill (Hungario), Barbara Pietrzak (Pollando) kaj José Antonio Vergara (Ĉilio). Ilia oficperiodo komenciĝos samtempe kun tiu de la cetero de la Komitato, en la unua tago de la 101-a UK en Nitro. Johan Derks (Serbio) kaj Roy McCoy (Nederlando) rezignis pri la kandidateco.

Krom la ses menciitoj, la Komitaton konsistigos la komitatanoj A, kiujn nomumos la landaj asocioj kun almenaŭ 100 membroj, la aliĝintaj fakaj asocioj (po 1) kaj la junulara sekcio TEJO (2). Por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj, la komitatanoj A kaj B povas kompletigi la Komitaton, alelektante komitatanojn C. En Nitro la tuta Komitato elektos el siaj membroj la Estraron de UEA.

**Legu pli ĉe:**

<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj>

## TEJO



### TEJO serĉas EVS-volontulon!

2016-05-24

Kadre de la Eŭropa Volontula Servo, TEJO invitas vin por iĝi plentempa TEJO-volontulo en la Centra Oficejo en Roterdamo. Esti volontulo signifas ne nur grave kontribui al la bonfarto de la organizo, sed estas samtempe persona pliriĝo. La volontulo laboras en la koro de la Esperanto-movado – la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio kaj TEJO, povas kunlabori pri tre [...]

**Legu pli ĉe:**

<http://tejo.org/2016/05/ni-sercas-evs-volontulon/>

### Iĝu Komitatano A de TEJO!

2016-05-04

Venis la tempo por nomumi Komitatanon A de TEJO por la oficperiodo de la 1-a de junio 2016 ĝis la 31-a de majo 2018 (vidu la ĉapitron 3.2 de la TEJO-regularo). La komitatanoj A estas reprezentantoj de la landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO. Krome, ĉiu nomumita Komitatano A membru dum sia oficperiodo minimume en [...]

**Legu pli ĉe:**

<http://tejo.org/2016/05/kandidatigu-por-esti-komitatano-a-de-tejo/>


**Por pli da novaĵoj iru al:**

<http://tejo.org/novajoj/>

## Leterojn ni ricevis el geamikoj



Pri la revuo Turka Stelo




Mi malkovris kun tre granda plezuro vian revuon. Ĝi meritas aplaŭdojn kaj kuraĝigojn. Malmultaj E-asocioj (novaj aŭ malnovajn) sukcesas lanĉi tiel valoran gazeton. Ĝia enhavo estas riĉa kaj tre diversa. Ĉiu leganto povas trovi

en ĝi ion plaĉan laŭ siaj gustoj kaj interesoj. Do gratulon kaj dankon minesprimas al la turka esperantistaro pro la tasko jam plenumita kaj kuraĝon por la venonta laboro.

Sukceson kaj longan vivon al Turka Stelo!

**Paule Burnel (Francujo)**

## Kiel kaj kial mi esperantiĝis - Rakontas Paule Burnel el Francujo



Mi estas sepdektrijara pensiulino. Mi loĝas en Toulouse, sude de Francio. Mia renkontiĝo kun Esperanto okazis tute hazarde. Jen kiamaniere.

Kiel multaj homoj mi aŭdis pri la ekzisto de Esperanto kiam mi estis ankoraŭ juna. Tiutempe la plej diskonata onidiro en mia ĉirkaŭaĵo estis, ke Esperanto estas tre bona ideo sed ke bedaŭrinde ĝi tute fiaskis kaj ke neniu plu parolas tiun "utopian" lingvon. La amaskomunikiloj kompreneble estis (kaj ankoraŭ nuntempe estas) tute mutaj pri tiu temo. Mi do "forĝesis" la aferon. Multe da jaroj pasis... Nur plurajn jarojn post mia emeritiĝo, ĉar mi interesiĝas pri lingvoj, iun tagon mi tajpis "esperanto" en la serĉilon Google scivolante je kio similas tiu lingvo kvazaŭ "mortnaskita". Estis por mi granda surprizo kaj ĝojo malkovri, ke Esperanto estas ankoraŭ nuntempe parolata en multaj landoj en la mondo eĉ en mia propra lando Francio, kie tre malmultaj personoj scias kio estas Esperanto. Retumante de retejo al alia retejo mia intereso plialtiĝis kaj inter aliaj mi trafis la paĝaron

Lernu. Mi tuj decidis lerni tiun allogan lingvon. Post kelkaj monatoj da memlernado mi komencis korespondi kun alilandanoj. Kia ĝojo povi komuniki kun homoj el foraj landoj, konatiĝi kun aliaj kulturoj!

Dank'al Esperanto mi havis la okazon interesiĝi pri la turka lingvo, kiun mi tre ŝatas kaj ankaŭ lernas kun plezuro de iom da tempo.

Krom la eblo komuniki kun homoj en la tuta mondo, kial Esperanto tuj pasiĝis min? Nu, al ĉi tiu demando mi respondas senhezite: mi ŝategas ĝiajn precizecon, logikecon, flekseblecon, esprimopovon kaj kompreneble ĝian facilecon. Mi povas diri sen mensogi, ke Esperanto ŝanĝis mian vivon. Hodiaŭ mi preskaŭ ne plu povas imagi pasigi unu tagon sen pli malpli praktiki Esperanton ĉu legante, aŭdante, skribante aŭ parolante kun samideanoj.

Mi nur bedaŭras, ke mi malkovris iom tro malfrue tian genian komunikilon. Sed malfrue estas preferinde ol neniam, ĉu ne?

### Vortareto

	froti	ovalamak	mirige	şaşırtıcı şekilde
	fulmorapidi	şimşek şeklinde hızlı olmak	moviĝi	hareket etmek
abunde	bolca	ĝena	ombro	gölge
aĉa	berbat	grumbli	plenplene	dopdolu
alloga	çekici	grundo	plezuro	memnuniyet
arbotrunko	ağaç gövdesi	infestita	pulo	pire
atingi	ulaşmak	iritita	ridetante	gülerek
baobabo	baobap ağacı	jukema	ripozi	istirahat etmek
bongusta	lezzetli	jukulo	ruliĝi	yuvarlanmak
bruema	gürültücü	kaptado	ŝajne	sanki
dorso	sırt	klopodi	samtempe	aynı zamanda
ekmanĝi	yemeğe başlamak	kontenta	savano	savan bölgesi
ekstari	ayağa kalkmak	korpo	senpage	ücretsiz
embarase	utanarak	kovrita	senprobleme	problemsiz
endormiĝi	uykuya dalmak	laĝeto	sia	kendi
finfine	nihayet, sonunda	lasi	simbiozo	simbiyoz, birlikte yaşam
forigi	uzaklaştırmak	lekante	soifo	susuzluk
formanĝi	yiyip bitirmek	malsati	stamfante	ayağı ile döverek ezmek



## ZEPO LA ZEBRO

- de Urmila Ellappan

Zepo piediris dum longa tempo en la afrika savano por atingi lageton. Pro soifo li trinkis abunde kaj poste ripozis en la ombro de baobabo, kie estas malpli varme.

Zepo provis endormiĝi sed li sentis sin tre malkomforta kaj jukema. Jam dum tagoj etaj puloj kovris lian korpon. Li provis forigi la pulojn svingante sian voston de unu flanko al la alia. Li provis forigi la pulojn stamfante per la kvar kruroj unu post la alia. Li eĉ provis stamfi per la kvar kruroj samtempe! Li frotis sian tutan korpon kontraŭ arbotrunko. Li provis forigi kelkajn pulojn lekante sian vizaĝon per sia longa lango. Sed ŝajne nenio funkciis! La puloj ne pretis foriri! Nenia svingado aŭ lekado, nenia frotado kaj stamfado povis forigi ilin. Finfine li estis tiom laca, tiom iritita ke li ruliĝis sur la grundo kun la piedoj supre en la aero. Sur alta branĉo de la dika baobabo li vidis du birdetojn. Ili estis tre bruemaj, signis per la okuloj kaj rapidis suben. "Mirige, ni fulmorapidis, ĉu vi bone travivis tion, Pik?" "Certe Pek, senprobleme!" "He, saluton, mi estas Pik!" "Kaj mi estas Pek, saluton!" Ridetante iom embarase Zepo ekstaris ree sur siaj piedoj. "Saluton, estas plezuro vidi vin, mi estas Zepo." "Vi estas kovrita de tiom bongustaj kaj allogaj puloj!" Pik kaj Pek metis sin sur la dorson de Zepo. "Bongustaj?" grumblis Zepo. "Mi estas plenplene infestita per ili! Mi ne sukcesos forigi ilin, kiom ajn multe mi klopodas." "Ni tre malsatas, Zepo kaj ni ege ŝatas pulojn. Ĉu vi bonvolus permesi al ni manĝi ĉiujn tiujn ... aĉajn bestetojn?" demandis Pik kaj Pek. "Certe, mi invitas vin tion fari!" respondis Zepo kun ĝojo. La birdo ekmanĝis. Ili kaptis la pulojn sur la vizaĝo kaj la kruroj, ili formanĝis tiujn sur la ventro de Zepo kaj ankaŭ sur la dorso. La zebro ne moviĝis kaj lasis la birdojn kapti tiom multajn kiel ili volis. Kaj finfine ili ĉiuj estis kontentaj. La zebro ne plu suferis pro la ĝenaj puloj kaj la du birdetoj ĝuis tre bongustan manĝon. "Multan dankon pro la kaptado de tiuj aĉaj puloj kiuj estis sur mia korpo." "Dankon..." "Dankon..." "Ho, ni devas danki vin ke vi lasis nin senpage manĝi tiujn jukulojn... tiujn pulojn." Kiam bestoj helpas unu la alian kiel Pek kaj Pik helpis al Zepo oni nomas tion simbiozo.



Fonto: [www.bookbox.com](http://www.bookbox.com)

Ligilo: <https://www.youtube.com/watch?v=WwMWpP71aJ8>

suferi	çekmek	tiom multaj	o kadar çok	zebro	zebra
svingado	sallama	travivi	durumu yaşamak		
svingante	sallayarak	vosto	kuyruk		

## Brazilano plantas 18 mil arbojn por savi la medion



**Brazilano plantas 18 mil arbojn por savi la medion.**

Lia sinteno ŝanĝis la vivokvaliton de tuta loĝantaro kaj kontribuis al la daŭripoveco de la planedo.

Ĉar la mondo alfrontas tutmondan varmigiĝon, mankon de akvo, klimatajn ŝanĝojn, inter aliaj problemoj, ni ne povas plu paroli pri daŭripova evolviĝo kiel io malproksima aŭ koncernanta aliulojn. Envere, ĉiu el ni bezonas ĉefrolon nian propran historion favore al la planedo. Kaj ni ĉiuj estas kapablaj realigi mirindajn aferojn. Ĉu vi volas unu ekzemplon?

Laca pro la scenejo de degenero kaj malpuraĵo ĉe iu granda avenuo, en konata kvartalo de la urbo San-Paŭlo, Brazilo, la stabano de entrepreno pri nutraj produktoj, Hélio Silva, decidis igi ĝin verda. Rigardante al la loko, kiu ŝajnis forlasita, li pensis: "Mi povas ŝanĝi kaj mi ŝanĝos".



Li do difinis celon planti grandan kvanton da arboj kaj rekuperi la tiaman pejzaĝon, kiu estis en tiu regiono antaŭ 200 jaroj. Kiel ĉiu defio, Hélio alfrontis multajn barojn. Al la raporto-skipo de la programo Biosfero, de TV Bona Volo, li rakontas ke dufoje oni dehakis ĉiujn arbojn, kiujn li plantis — entute 600 estis dehakitaj. Ekkonu tiun historion:

Nun la avenuo fariĝis la unua linia parko de San-Paŭlo, nomata Tiquatira. Post multe da laboro, 18 mil arboj el pli ol 170 specioj de la atlantika arbaro, la parko akceptas ĉiutage loĝantojn de la regiono por piedrado, praktiko de sportoj kaj distro, krom beligi la pejzaĝon en la regiono. "Post tiuj 12 jaroj, ni perceptis ke, dum la semajnfino, 5 mil

personoj piediras ĉi tie; antaŭe piediris nur 50, kaj cetere kun timo. (...) Ni ŝanĝis la aspekton de la loko kaj rekuperis la memestimon de la personoj", li rakontas.


Kaj Hélio garantias ke li ne haltos kaj deziras ke la sekvaj generacioj ĝuu la vivokvaliton, kiun la loko ofertas, kaj estu inspiritaj de lia sinteno. De jardekoj la edukanto Paiva Netto konsilas ke "Kiam oni efektive emas fari ion, oni faras. Ne kredu tion, ke ĝi estas malfacila. Aferoj estas malfacilaj nur por malfacilaj homoj. Homoj simplaj plenumas eksterordinarajn aferojn". Kaj vi, kiu estas via historio favore al la planedo?

**Fonto: Daŭripova Evolviĝo**

[http://www.boavontade.com/eo/dauxripova-elvolvigxo/brazilano-plantas-18-mil-arbojn-por-savi-la-medion-0?utm\\_source=email-mkt&utm\\_medium=email&utm\\_content=btntxt&utm\\_campaign=dia-biodiversidade](http://www.boavontade.com/eo/dauxripova-elvolvigxo/brazilano-plantas-18-mil-arbojn-por-savi-la-medion-0?utm_source=email-mkt&utm_medium=email&utm_content=btntxt&utm_campaign=dia-biodiversidade)



## La 101-a UK okazos de la 23-a ĝis 30-a de julio en Nitra, Slovakio



<http://www.nitra2016.sk/>

## Ŝercoj



Konsilo de francjuda fizioterapisto:

"Se virino estas bela, komplimentu al ŝi ke ŝi estas saĝa. Se ŝi estas saĝa, komplimentu ke ŝi estas bela.

Kaj se vi ne estas certa... diru ke ŝi maldikiĝis."

Tre riĉa Usonano festis sian 95-jaran datrevenon. Li invitis al sia hejmo siajn 3 plej proksimajn amikojn: katoliko, protestanto kaj judo. Ĉeestis ankaŭ lia advokato.

Li anoncis al ili la jenon: "Mi deziras heredigi al vi po 100 milionoj da dolaroj. Sed mi havas unu kondiĉon: Dum mia enterigo ĉiu el vi devos meti en mian ĉerkon 100 mil dolarojn. Tio estos pruvo, atesto, kiu montros ke vi fidis min.

Post kelkaj monatoj li forpasis. Ĉe la tombo, sub la strikta kontrolo de la advokato, la katolika amiko enĉerkigis 100 mil dolarojn kontante. Same faris la protestanto.



Tiam venis la judo, elprenis de la ĉerko la 200 mil dolarojn kaj enĉerkigis anstataŭe ĉekon je la sumo de 300 mil dolaroj.

## Krucvort-Enigmo



### Horizontale

3. Tuto de la veteraj kondiĉoj en difinita regiono, rigardataj el la vidpunkto de la tie vivantaj estaĵoj kaj precipe de la homo.
4. Kolekto de objektoj.
5. Subita, tre malfeliĉiga okazaĵo,

kiu kaŭzas al personoj aŭ objektoj damaĝon nelimigitan.

8. Kelkhista tubeto, rekondukanta la sangon al la koro.
9. Konsistanta el pli-malpli pura metalo, rigardata kiel tre multevalora.
10. Ago de iu, kiu per voĉdonado montras preferon por kandidato.

### Vertikale

2. Komputila eligilo, kiu vidigas informojn al la uzanto.
3. Koncentri sian atenton al la ideo de ia ago, por ke ĝi efektiviĝu.
4. Per malsimila speco de agado, ol la kutima (adverbo)
5. Vira vesto, malfermebla ĉe la antaŭa parto, manikhava, kovranta la korpon de la ŝultroj ĝis la

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										
11										

koksoj.

7. Difinita monsumo, pagenda por la impostoj, metitaj super importaĵoj aŭ eksportaĵoj de varoj.
8. Aro da personoj, unisone aŭ plurvoĉe kantantaj.
9. Okupo, profesio, konsistanta en plenumo de publika aŭ privata servado.

**La solvo de la krucvort-enigmo troviĝas en la lasta paĝo.**

## Poemoj de Kálmán Kalocsay (1891-1976)

### PROLOGO ANTAŬ LA TEATRA VESPERO\*

Bonvenon, karaj fratoj,  
Pro laŭtaj korobatoj  
Lang' mia nur balbutas,  
Korbatoj vin salutas.

Mi estas la Prologo,  
Alvoko kaj allogo  
Por gaja kor-amuzo  
Per nia farsa Muzo.

Ŝi estas iom stranga,  
Kaprica kaj klaĉlaga.  
Kunmiksas aĵojn multajn  
Tre saĝajn kaj tre stultajn.

Ŝi timas nur enuon  
Kaj volas: larmofluon  
En dolĉ' — malĝoja revo,  
Kaj — ridon ĝis la krevono.

Ŝi venas ja laŭveste  
Malriĉe kaj modeste,  
Laŭ pov' ŝi estas eta  
Sed ami, flami preta.

Babilas ŝi naive  
Je la kompren' soife.  
Ŝi, de l' esper' ebria,  
Mem estas koro nia.

Se estus por malplaĉo  
Longega ŝia klaĉo,  
Mallaŭte — do — mallaŭdu,  
Sed laŭte, ho, aplaŭdu!

(1921)  
*\*Verkita por la postkongresa  
aranĝaĵo en Budapeŝto, 1921.*

### LARMOJ\*

La larmoj ie amasiĝas  
Guto post gut' en apati'...  
Ho, larmoj el hungar-okuloj...  
Neniam fluis pli.

La larmoj ien falas, iras,  
Sen ĉeso verŝas sin malĝoje,  
Sed je oceano ŝvelinte  
Revenos ili foje!

Kaj tiam ili forbalaos  
Eksterme ĉion, sen kompat'!  
Marego estos Ter' de kulpoj,  
Ne estos Ararat!

La larmoj ie amasiĝas  
Guto post gut' en apati'...  
Ho larmoj el hungar-okuloj  
Neniam fluis pli...

(1921)  
*\*La poemon verkis Kalocsay okaze  
de la unua postmilita packontrakto  
inter la venkintoj kaj Hungario. Laŭ  
la "Trianona Packontrakto"  
Hungario perdis 71,5 procentojn de  
sia teritorio kaj 54 procentojn de la  
loĝantaro.*

### AL LA LEGANTOJ\*

"Mia prozo, miaj rimoj  
Estas peto kaj allogo,  
Frapas pordojn de l' animoj  
Por kunhelpo kaj apogo.

Karaj fratoj, ĉesu dormi!  
Jen, la sorto kubon ĵetis.  
Estas, kion nun ni petis,  
Same por vi, kiel por mi.

Volas mi el eta ĝermo  
Kreski, flori, lukti, spiti,  
Volas mi per brava skermo  
Tutan mondon almiliti,

Kaj per milda tuŝ' al koroj  
Porti: revojn, larmorulon,  
Kaj konsolan, molan lulon,  
Kaj ŝercvapon al doloroj:

Kion dolĉa Muz' kun beno  
Donas por volupto pura:  
Ĉiujn florojn de l' ĝardeno  
Arta kaj literaturo.



Fratoj, do al via sin'  
Prenu min, la infaneton,  
Ho, aŭskultu mian peton,  
Legu, amu, verku min!"

(1922)  
*\*Je la apero de Literatura Mondo.*

### KARA LUDOVIKO!

Je l' nomtago de via kion mi deziru?  
Vian vivon ĉiam en sunbril' vi iru.  
Vin evitu, timu la sort' malfeliĉa!  
Poŝ' je mono, kor' je ĝojo estu riĉa!  
Deziritan skuu el la jakmanikoj!  
Amu vin, kaj helpu aro da amikoj!  
Kaj mildigu vent' se blovis sovaĝe,  
Ĝi karesu milde, mole vin vizaĝe,  
Alportinte famon pri knabinoj-floroj  
Pleniginte vian koron per odoroj.  
Kion diri? Estu por vi do donata  
Kion vi deziras al la plej amata,  
Al la plej amata de vi en la mondo.  
Kaj nun ... kio estu fino de la kanto?  
Vivu, kresku, floru nia Esperanto,  
Fluu tra la tero kiel vasta ondo.

Amike K.

(1913)



## Impresoj el Turkio - verkis Cecile Anda

### IMPRESOJ EL TURKIO

*Vojaĝo al 9-a Mezorianta kunveno en Kapadokio*

La pasintan jaron mi partoprenis la 100-an Universalan Kongreson de ESPERANTO en Lille, Francio. Tio estis granda travivaĝo emocie kaj intelekte. Dum multaj jaroj pro familiaj kaŭzoj ne eblis por mi viziti kongresojn kvankam mankis al mi tion

Dum la kongreso mi amikiĝi kun Suzanne Røy el Kebekio kaj Murat Ozdizdar el Turkio. Ambaŭ estas aktivaj esperantistoj kiuj instruas la internacian lingvon.

Komence de la jaro Suzanne skribis al mi ke ŝi partoprenos la 9-an Mezoriantan Kunvenon en aprilo en Turkio kaj proponis ke mi kunestu. Kun ĝojo mi jesis.



Neniam mi vizitis Turkion. Mirinde alveni al Istanbul. Suzanne bonvenigis min en la flugaveno. Ni ĝojis revidi unu la alian. Imagu la etoson! Frumatene mi forlasis la kvietan, malvarman kamparon kie mi loĝas en la sud-okcidenta regiono de

Norvegio kaj postagmeze mi staris meze de la europa parto de urbego inter amasoj da homoj, bruoj, novaj odoroj, en milda temperaturo. Miaj okuloj senlace spektis mirindajn konstruaĵojn, imponajn moskeojn, multkolorajn parkojn apud nefinkonstruitaj domoj, difektitajn trotuarojn; ĉie kontrastoj !



Tiam komencis la surprizoj.

Murat atendis nin en Üsküdar. Ni transŝipis al la asia parto de la urbo kie mi malkovris la gigantan Bosforon sub sunsubiro.



En varma esperanta etoso ni vespermanĝis en kvartalo plenplena da komercejoj, restoracioj, homoj.

La postan tagon gvidis min Suzanne al la Blua Moskeo, Sultanamet, la Palaco Topkapi, la Bazilika Cisterno.. tiom da neesprimeble belaj vidindaĵoj.

Vespere ni flugis ĝis Nevşehir.

Kapadokio situas meze de la lando inter du sed nun ne aktivaj grandaj volkanoj, sur tre malseka altebenaĵo ĉirkaŭ 1000 metrojn alta. La sekvantaj erupcioj de du volkanoj kiuj elĵetis cindrojn kaj lafojn formis tavolojn de molaj kaj malmolaj terformaĵoj. La erozio akva, glacia kaj venta modifis la reliefon al tre specialaj aspektoj; malfacile priskibi sed kiujn oni vidas sur la simbola signo de la kunveno en Ürgüp.



La organizantoj Vasil Kadifeli kaj Murat bonvenigis nin. Bedaŭrinde, nur 25 esperantistoj el 13 landoj partoprenis la kunvenon . La organizantoj atendis pli sed pro la politikaj cirkonstancoj sufiĉe da homoj ne partoprenis.

La renkontiĝo daŭris 4 tagojn plenplenaj da interesaj prelegoj, debatoj, amikecoj, babiladoj. Interalie la tre vigla Vasil raportis pri la Esperanto-Movado en Turkio (evoluo kaj problemoj ), prezentis la revuon de la turka esperantistaro «Turka Stelo», prelegis pri la historio de Kapadocio, parolis pri Nâzim Hikmet kaj prezentis filmojn de kaj pri la poeto.




Renato Corsetti (italo) enkondukis debaton pri la rifuĝintoj kaj fareblaj agadoj en la Meza Oriento kaj Norda Afriko. Aliflanke kiel filologo li demonstris

similecon inter la turka kaj esperanto. Ambaŭ lingvoj stariĝis kun gramatikaj strukturoj regulaj kaj kun ebleco regule fari kunmetitajn vortojn. Ili estas ambaŭ fonetikaj.

Mireille Grosjean (svislendo) aktiva membro kaj prezidanto de ILEI, prezentis la «Programo pri Aktiva Maturiĝo» ligita al la agadkampo pri kapablo de aktivuloj, unu el la ĉefaj ĉapitroj de la strategia laborplano de UEA.

Annie Grente (franco) rilatis siajn spertojn pri instruado de Esperanto en Tanzanio.

Anna Lowenstein (anglo) instruis al komencantoj Esperanton kaj prelegis pri la Cseh metodo ; kiel la instruisto devas esti aktoro.



Öykü Mete (turko) tre taŭga lernantino prelegis pri la fama homo de Ürgüp, Mustafa Güzelgöz (1921- 2005) bibliotekisto kiu fondis movantan bibliotekon transportinte

librojn en kestoj sur azeno por inciti homojn legi.

Mi partoprenis en la du tuttagaj ekskursoj tre bone organizitaj kie mi malkovris la ampleksan regionon de Kapadokio kun la strangaj, diversaj pejzaĵoj kies koloroj magie ŝanĝiĝas laŭ la sezono kaj la tempo dum la tago.



Ni vizitis la keramikan muzeon «Güray Müze» sub la tero en Avanos.

Ni pilgrimis en la subĉiela muzeo proksime de «Göreme», valo kies monaĥejoj kaj preĝejoj estis konstruitaj en la mola roko mem, uzitaj inter la 5-a kaj 12-



a jarcentoj.

Dum la ikonoklasta periodo la freskoj estis kovritaj per kalkaĵo kaj oni faris geometriajn desegnojn sur ili.

La dua tago ni subteriĝis por malkovri la vilaĝon «Kaymakli» konstruita sub la tero en la sama

terformaĵo kreita de la volkanoj.



Staras ok etaĝoj atingeblaj kun mallarĝaj koridoroj. Oni trovas lokojn por konservi varojn, restadi bestojn, fari vinon aŭ oleon kaj vivi kiam la atakantoj invadis la supran vilaĝon. Troviĝas ankaŭ ĉambroj, manĝoĉambroj, preĝejoj, bona sistemo por aerumi kaj reservado de akvo. Oni uzis rondajn stonojn, similaj al muelŝtonoj, kiel pordo por bari la koridorojn por sin protekti. Tiel ili povis vivi subtere plurajn monatojn.

Ni piediris en la valo de «Ihlara», tre profundan kanjono traŭrita de rivero «Melendiz» kaj bordita de popoloj.

Ni haltis en «Karavansaraj» aŭ karavenjo sur la silka vojo kie la komercistoj loĝis dum nokte kiam ili travojaĝis inter Azio kaj Eŭropo transportante valorajn aĵojn.

Post tiuj travivaĵoj mi devis adiaŭi iom malgaje la samideanojn, sed kun Suzanne la aventuroj daŭris.

Murat invitis nin al lia ĉarma somera domo «Esperanto domo» en vilaĝeto sude de Istanbul proksime de Iznik, la fama loko kie oni produktas belegajn blujn ceramikaĵojn. Ni en varma etoso trapasis du tagojn.



Revenante al Istanbul, ni decidis veturi en la direkto de la nigra maro ĝis Safranbolu, la loko kie oni produktas safranon. En tiu ĉarma malnova vilaĝo ni spertis la «hamam» turka banejo kun masaĝoj, tre agrabla momento fine de la ferioj.

Dum la vojaĝo mi provis legi la fremdan lingvon kompreneble preskaŭ sensukcese, sed dank al esperanto kaj mia kebekia amikino kiu lernis la turkan mi ne perdiĝis.

Kiam mi haltis por vidi pentraĵon de Malala Yousafza sur la muro de teknika altlernejo en Kadiköy, oni skribis :

*unu infano  
unu studento  
unu libro kaj unu kajero  
ni povas ŝanĝi la mondon.  
Donu voĉon al knabinoj !*



En konstruaĵo de asocio de ĵurnalistoj oni legas:

*Ni ne timas  
Ni estas en la strato !!*


Por konkludi mi diras :

*Vizitu Turkion !  
Vizitu esperantistojn !*

**Cécile Anda**

## Barcelono iĝis la unua 'vegan-amika' urbo en la mondo.

**VeganArto**



Barcelono sin deklaris "urbo vegan-amika", tio estas, urbo amika al la vegetara kaj vegana kulturoj. Tiel aprobiĝis en la komisiono de Ekonomio kaj Financoj de la Urbodomo de Barcelono (Hispanio) en propono iniciatita de Respublika Maldekstro de Katalunio, kiu kalkulis je la voĉdonoj de la partioj Bcomú, CiU, PSC kaj la CUP kaj la sindeteno de Civitanoj kaj Popola Partio.

Per tiu ĉi aprobo, Barcelono akiris la devon akceli serion de agadoj por ke la urbo iĝu "Veg-Friendly" (VeganAmika). Unu el ĉi tiuj ĉi estas la aliĝo al la internacia kampanjo 'Senviandaj lundoj' (Meat Free Monday) por ke la nutrado kiu venas el la registaraj instancoj de la urbo estu vegetara "volonte" ĉiun lundon.

Kreado de la 'BCNvegPoint' (vegana informejo pri veganismo en Barcelono) kaj nova vegetara gvidlibro.

Ĉi tiu interkonsento inkluzivas la kreadon de la 'BCNvegPoint' kiel renkontiĝejo por entreprenemuloj, neregistaraj organizoj, konsumantoj kaj investantoj kun la celo favorigi la etan kaj mezan lokan komercadon, proksima, vegana kaj vegetara, laŭ la teksto de la propono.

La publikigado de nova vegetara gvidlibro de Barcelono kaj la kreado de poŝtelefona aplikaĵo por informi la barcelonanojn kaj turistojn pri la vegetara kaj

vegana komerco estas aliaj el la iniciatoj.

Alfred Bosch, prezidanto de la municipa grupo de Respublika Maldekstro de Katalunio, dankis al la grupoj kiuj subtenis la proponon kaj asertis ke "per tiu ĉi nova kompromiso Barcelono ree montras, kiel ĝi jam faris aliajn fojojn, ke ni estas avangarda urbo pri la respekto al la medio, la homoj kaj la bestoj". Tamen, Popola Partio kaj Civitanoj sindetenisĉar ili konsideras ke tiu ĉi decido devus esti "persona afero" kaj ke ĝi povus "limigi la liberecon pri manĝokutimoj".



**Fonto:**

**<http://veganarto.net/barcelono-igis-la-unua-vegan-amika-urbo-en-la-mondo/>**

## Mallonga Historio de Filozofio (7)



**Saluton,**

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la mallongan historion de Filozofio kun la stoikistoj. Ili kunvenis sub "Stoao" kaj pro tio oni nomis ilin tiel. "Stoao" estas kovrita loko ĝuste kiel tiu, kiun vidas en la jena foto.


**Vasil Kadifeli**



### Epikteto, Cicerono, Seneko

En la vivo estas multaj aferoj, kiujn ni ne povas ŝanĝi. Ekzemploj povas esti de pluvo al maljuniĝo kaj morto ktp. Do se oni akceptas tiujn aferojn, oni estas nomata "filozofo". Ĉar tiu grupo de folozoj t.e. la "stoikstoj" pri kiujn ni parolos en ĉi tiu numero estas tiuj, kiuj kredis, ke oni ne konsideru sed simple akceptu tiajn aferojn.

En Ateno la unua frua "stoikulo" estis Zenono el Kipro. La stoikuloj instruis al homojn regi la pasiojn kaj indiferentadi al plezuro kaj doloro. La stoikistoj provis kontroli la menson. Eĉ al morto de amata persono ili provis resti indiferentaj. Ili pensis ke ni mem elektas niajn sentojn kontraŭ la diversaj okazaĵoj sur kiuj ni ne havas kontrolon. Ili kredis ke sentoj malhelpas la menson kaj decidon do oni ne nur devas kontroli la sentojn sed ankaŭ provi forigi ilin entute.




**Epikteto**

La bone konata stoikulo de Ateno estis Epikteto, kiu fakte estis sklavulo kaj travivis multajn malbonaĵojn. Li pensis ke tamen nia korpo povas esti sklava la menso povas esti libera. Niaj pensoj kontraŭ la diversaj okazaĵoj en nia vivo estas rekte ligitaj al ni mem.

Tiu filozofio kiu komenciĝis en Ateno, poste fariĝis fama en la Romia periodo.


Cicerono (Marcus Tullius Cicero) kaj Seneko (Lucius Annaeus Seneca) adoptis tiun filozofion en Romio. Ili pensis multe pri maljuneco kaj mallongeco de vivo kaj kredis ke ni tre lerte devas utiligi nian mallongan vivdaŭron.



**Cicerono**

Cicerono estis politikisto kaj advokato. Li verkis la libron "Pri maljuneco" en kiu li parolis pri kiel oni povas elteni la malfacilaĵojn de maljuneco. Li kredis ke la animo estas senmorta do oni ne timu morton.

Seneko estis politikisto, teatra verkisto kaj tre sukcesa entreprenisto. Li ankaŭ havis la samajn pensojn de Cicerono. Li verkis libron pri la mallongeco de la vivo. Li kredis ke ni devas utiligi nian mallongan vivon kiel eble plej bone kaj ke ni ĉiam devas havi kontrolon sur nia vivo.



**Seneko**

La stoikuloj pensis ke homoj devus vivi kiel monaĥoj do Seneko proponis ke oni devas vivi kiel filozofo. Seneko havis tre perturbatan vivon. Pro politikaj akuzoj li estis sendita al ekzilo. Poste li revenis al Romo ka fariĝis instruisto de juna Nerono. Tamen en la postaj jaroj kiam Nerono fariĝis imperiestro Seneko estis akuzita pro politikaj intrigoj kontraŭ Nerono kaj Nerono ordonis ke li memmortigu sin. Sed per tia filozofio Seneko sukcesis vivi trankvile dum lia tuta vivo.

Ni devas rigardi al stoikismo kiel ia psikoterapio. Se ni sukcesas forigi la ĝenojn de nia vivo tiam vivo estos pli simpla. Ankaŭ se ni sukcesas esti indiferenta kontraŭ la malbonaĵoj de nia vivo, tio povas malaltigi niajn malfeliĉecojn.

Sed ne forgesu ke en tiu kazo ni perdas la karakteron de nia vivo ĉar tiam ni fariĝas senkora, malvarma, eĉ nehoma persono.

**(daŭrigota)**



Dum kelkaj tagoj la gefratoj vidis nenion kaj aŭdis nenion, kio povis helpi ilin. Iun tagon, dum la matenmanĝo, Andreo subite demandis al la onklo:

“Ni ofte vidas la gardistojn, kiuj marŝas laŭ la riverbordo. Ĉu multaj

kontrabandistoj transiras la riveron?” La onklo respondis, “Kompreneble ne. Oni tuj kaptus ilin!”

Ti estis ĝuste kiel Andreo antaŭe pensis, kaj li komencis dubi pri la afero. Li malfermis la buŝon por demandi plu, sed subite Lizbeta piedfrapis lin sub la tablo, kaj li kaptis avertan rigardon de ŝiaj brunaj okuloj.

“Ne menciu la pakaĵon!” la okuloj ŝajnis diri, kaj li restis silenta.

Du pluaj tagoj pasis sen okazaĵo, se je la tria tago, dum onklo Konrado laboris en la kampoj, kaj onklino Maria vizitis la vilaĝon por paroli kun amikino, Lizbeta subite kuris en la ĉambron, kie Andreo legis libron.

“Andreo!” Ŝi kriis. “Rigardu, kion mi trovis!”

Ĝi estis ŝlosilo.

“La ŝlosilo de la kelo!” klarigis Lizbeta.

La gefratoj rigardis unu la alian kun ekscito; tiam Andreo iris al la pordo.

“Venu, do,” li kriis. “Rapide! Ni devas eniri la kelon kaj rigardi antaŭ ol la onklino revenos.”

Rapide ili kuris al la pordo de la kelo, malŝlosis ĝin, kaj puŝis ĝin. La pordo estis peza, kaj grincis laŭte. La ĝemeloj paŭzis, time.

“Estas nenio,” diris Andreo, fine, “Ĝi sonas laŭte ĉar ĉio alia estas silenta.”

Do, ili malfermis la pordon kaj kviete malsupreniris la malluman ŝtuparon. La kelo estis mallumeta, sed ili povis vidi sufiĉe por promeni ĉirkaŭe en la granda ĉambro. Ĝi ŝajnis esti malplena. Ili serĉis ĉie, sed trovis nenion. En la dekstra muro estis pordo, kaj kiam ili estis certaj, ke estas nenio alia, ili puŝis ĝin. Ĝi ne estis ŝlosita, kaj ili facile malfermis ĝin. Ili trovis alian grandan ĉambron ... ankaŭ malplena! Estis nenio en la tuta kelo!

En la mallumeto la gefratoj rigardis unu la alian. Kion ili faru nun?

“Eble estas sekreta pordo en unu el la muroj,” flustris Andreo, kiu ofte legis pri similaj aferoj. “Ni frapu ilin por aŭdi, ĉu ili estas solidaj.”

Atente la geknaboj ekzamenis la ŝtonajn murojn de la kelo, kaj frapis ilin, sed ili estis ĉiuj el solida ŝtono.

“Do, ni scias,” mallaŭte diris Lizbeta, kiam ili estis denove ĉe la ŝtuparo, “ke estas absolute nenio en la kelo. Ni devos atente rigardi por vidi, ĉu iu metos pakaĵon tie.”

Kaj ili supreniris la ŝtuparon kaj ŝlosis la grandan pordon. Tiam Lizbeta remetis la ŝlosilon ĝuste kie ŝi trovis ĝin, kaj ili komencis pretigi la tagmanĝon.

Post la manĝo, ili ludis apud la domo, kaj ĉiam, kiam la onklo eniris la domon, unu el ili faris pretekston por eniri ankaŭ, sed la farmisto ne iris al la pordo de la kelo. Venis la vespero, kaj la onklino lumigis la lampon. La gefratoj sidis kie ili povis vidi la pordon de la kelo, kaj ludis kartojn. Sed neniu iris al la pordo, kaj je la naŭa horo onklino Maria enportis la kutimajn glasojn de lakto: ili trinkis, kaj la kvar personoj iris en la litojn ĉar en farmdomo oni ĉiam frue enlitiĝas.

La sekvantan tagon, post la matenmanĝo, la farmisto eliris por labori en la kampoj, kaj la ĝemeloj denove ludis apud la domo. Subite ili aŭdis brueton malproksiman, kaj rigardis laŭ la vojo, kiu kondukis al la vilaĝo. Post kelkaj momentoj ili vidis aŭtomobilon, kiu venis al la farmdomo. Ĝi estis la kutima aŭtomobilo, kiu venis por la pakaĵoj.

“Hodiaŭ li venas vane,” ridetis Andreo. “Ne estas pakaĵo en la kelo.”

La aŭtomobilo haltis, kaj la viro eliris.

"Bonan tagon, infanoj," li salutis ilin. "Ĉu via onklo estas hejme?"

Lizbeta iris por venigi la farmiston, dum Andreo restis apud la aŭtomobilo.

"Mi supozas, sinjoro, ke vi estas komercisto, kiu aĉetas la produktaĵojn de la farmbieno?" li diris post kelkaj momentoj.

La viro rigardis lin strange, kaj tiam respondis.

"Jes, tio estas vera," li diris. "Mi jam aĉetas de s-ro Parano dum longa tempo."

Je tiu momento Lizbeta kaj la farmisto aperis, kaj onklo Konrado salutis la vizitanton.

"Envenu, Joĉjo," li kriis, kaj la du viroj eniris la domon. Ili iris en la oficejon, kaj fermis la pordon. Andreo kaj lia fratino restis ekster la domo, sed rigardis tra la nefermita dompordo.

Dek minutoj pasis; tiam la pordo de la oficejo malfermiĝis kaj la du viroj reaperis. Dum la vizitanto atendis en la manĝoĉambro, la farmisto iris al la pordo de la kelo, malŝlosis ĝin, kaj malsupreniris. Post kelkaj momentoj li reaperis, kun la kutima granda pakaĵo!

Senmovaj pro surprizo, la ĝemeloj rigardis dum li

donis la pakaĵon al la vizitanto, kiu portis ĝin al la aŭtomobilo. Li adiaŭis la farmiston kaj la infanojn, kiuj ankoraŭ staris senmovaj, kaj forveturis.

Onklo Konrado reiris al la kampoj, kaj la infanoj malrapide ekpromenis.

"Tio ja estas mistero," diris Andreo, kiam la farmisto malaperis. "Ni scias, ke la kelo estis tute malplena, kaj ne estas sekreta pordo tie. Tamen la onklo eniris kaj elportis la pakaĵon. De kie ĝi venis?"

"Ĝi ne povis marŝi," respondis Lizbeta, kiu forte pensis, "Kaj ĝi ne povis trairi la murojn. Do, devas esti, ke iu metis ĝin tien."

"Sed ni konstante rigardis la pordon," diris Andreo.

"Ni rigardis dum la tago," konsentis lia fratino, "kaj neniu eniris la kelon. Do, oni enmetis ĝin dum la nokto."

"Do, ĝi ja estas sekreta afero," diris Andreo. "La viro diris al mi, ke li estas komercisto, kiu aĉetas de la onklo la produktaĵon de la farmbieno. Mi ne dubas, ke li estas komercisto, kiu aĉetas ion de la onklo. Sed mi tre dubas, ke tio estas farmproduktaĵo!"

(daŭrigota)

## Afrika Kongreso de Esperanto



La sesan fojon Afriko sin preparas por celebri la plej gravan eron de sia agado, nome la Afrikan Kongreson de Esperanto. Tiu tutkontinenta renkontiĝo gastos en la norda tanzania urbo Bunda, de la 24a ĝis la 31a de decembro 2016.

La kongresaj organizaj laboroj okazas kunlabore inter la Afrika Komisiono de UEA kaj la Tanzaniaj aktivuloj, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio.

Tiu jara kongreso ne organiziĝas kiel renkontiĝo nur por afrikanoj, sed kiel evento por parolantoj de

Esperanto kaj geamikoj de Afriko. Ankaŭ pro tio ĉiam bonvenas diverskontinentanoj por kiuj ĝuste estos oferto de abundaj aktivaĵoj por malkovrigi al ili la multflankajn aspektojn de la kongresa lando kaj la situacion en unuopaj afrikaj landoj.

Ekde la 1990a jaro Afrika Kongreso estas la plej grava ero de la Afrika Agado kun ampleksa programo por kuraĝigi kaj kunigi esperantistojn ĉirkaŭ bela sonĝo: kunlaboro interafrika por pliaj paŝoj kaj helpi disvastigi Esperanton, cele al la komuna progreso de Afriko.

Tiu tradicio do estas jam 26-jara ĉi-jare, sed la kongreso en Bunda portas la numeron 6, ĉar okazis 17-jara paŭzo inter la 4-a kaj la 5-a, el kiu estis komuna decido okazigi ĝin pli regule en trijara ritmo.

“Mi finlernis Esperanton en 2009 kaj nun verve zorgas ĝian disvastigon en Rutshuru. Mi instruas ĝin ĉe radio-programo kaj en orfa bazlernejo. Mi neniam partoprenis en Esperanto-renkontiĝo ekster mia hejmurbo. Mi deziras ĉeesti en la 6-a AKE por paroluzi mian Esperanton kun novaj geamikoj kaj sperti pri kongresa atmosfero, sed pro limigita eblo mi ne povos pagi mian vojaĝon kaj restadon en la kongreso. Mi petas vin bonvolu helpi min efektiviĝi tiun mian revon”, – skribas en letero aktivema junulo el DR Kongolando.

Kvindeko da tiaj petoj estis ricevita el la kontinento. Do, se vi decidus subteni la kongresan kason tio eblas laŭ la konto “Afriko” ĉe UEA kun indiko “AKE-2016” por ebligi realigon de vera tutkontinenta kongreso almenaŭ subsahara.

Eblas multon ekscii pri AKE per la retejo: [www.esperanto-afriko.org](http://www.esperanto-afriko.org) kaj ricevi utilajn informojn ĉe la organiza komitato, skribante al [ake-2016@yahoogroupes.fr](mailto:ake-2016@yahoogroupes.fr)

**Fonto: Gazetata Komunikado de UEA, 2016, №613.**  
**El la Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2016/05/afriko/>**

## Internacia Tago de Familio



### Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj

La 15a de majo estas proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kiel Internacia Tago de Familioj, kies ĉi-jara temo estas “Familioj, sanaj vivoj kaj daŭripova estonteco”. Nome de la miloj da Esperanto-parolantaj familioj, kiujn ĝi bonvenigis inter si tra la jaroj, Universala Esperanto-Asocio esprimas sian daŭran sindediĉon al tiuj idealoj, inkluzive de la tri aspektoj ĉi-jare emfazataj: (1) La sano kaj bonfarto de infanoj kaj junuloj, (2) Ekvilibro inter laboro kaj familio kaj la rezultaj sanefikoj, kaj (3) Pli alta vivokvalito por pli aĝaj personoj.

Ekde sia fondiĝo en 1908, nia Asocio laboras por transponti la dividojn inter homoj kaj nacioj. Ne malofte, tiuj agadoj kondukas al internaciaj geedziĝoj kaj la starigo de familioj kies infanoj ĉehejmas en pli ol unu kulturo. Antaŭ cent jaroj, meze de la Unua Mondmilito, la juna Asocio laboris, el sia sidejo en la neŭtrala Svislando, por utiligi la Internacian Lingvon Esperanto kiel ilon por reunuigi familiojn dividitajn de la milito, kaj por starigi kontakton kun familianoj izolitaj de siaj parencoj.

En pacaj periodoj, ni celis disvastigi la lernadon kaj instruadon de Esperanto kiel vojon por malfermi la mondon al infanoj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj egale; al ĉiuspecaj familioj, ĝi reprezentas unikan manieron por partopreni en internacia komunumo ligita per vojaĝado, literaturo kaj aliaj komunaj spertoj. Hodiaŭ la Asocio organizas ĉiujaran tutmondan renkontiĝon

de Esperanto-parolantaj infanoj, kaj niaj aliĝintaj asocioj en pluraj landoj aranĝas ĉiujare kunvenojn de Esperanto-parolantaj familioj.

En la hodiaŭa tago, en mondo kie multe tro da familioj estas dividitaj aŭ dislokitaj de milito kaj politika subpremo, kie multe tro da familioj vivas en malriĉeco aŭ sub minaco de malsano, kie multe tro da familioj vane serĉas ekvilibron inter laboro kaj familio, ni esprimas nian firman deziron, nome de ĉiuj parolantoj de Esperanto, labori por pli sana, pli egaleca, pli tolerema kaj pli paca mondo en kiu la familia vivo estu plifortigita en maniero kiu avantaĝas ĉiujn familiojn kaj ĉiujn individuajn familianojn.

**Fonto: Gazetata Komunikado de UEA, 2016, №612.**  
**El la Balta Ondo: <http://sezonoj.ru/2016/05/gk-50/>**



TRE GRAVA KAJ TRE INTERESA ARTIKOLO, PRI NIA KARA LINGVO, DE **SPIROS SARAFIAN** SENDITA EN LA ESPERANTO-GRUPO "LA BONA LINGVO"

---



Dum multaj jaroj, en ĉia okazo mi konstante protestas, mi ne ĉesas klopodi per miaj sensignifaj fortoj kaj mia seninflua, malofta publika interveno, subteni la ideon, ke nia lingvo estas en evidenta danĝero, ke ni devas ĉiaforte ĝin protekti.

La internacia lingvo por esti facila, simpla, klara, devas unue esti severe regula. Ni devas ne lasi Esperanton iĝi lingvo-knedaĵo, nia lingvo ne povas resti senforma modlaĵo en la disono kaj bontrovo de ĉiuj ajn "geniuloj", kiuj de podioj oficialaj de nia movado uzas ĝin laŭplaĉe.

Ĉi-tie mi ne parolas pri la sufiĉe multaj "modifantoj", pri la novaj Zamenhofoj, kiuj falsas la lingvon per arbitra enkonduko de abundaj anglismoj kaj aliaj forĵetindaĵoj.

Mi bone komprenas, ke oni ne povas fondi lingvan policon kiu trudos la ĝustan uzon de la lingvo kaj punos la falsantojn.

Krome, mi bone scias ke kiel estas greklingvanoj kiuj misuzas la grekan, franclingvanoj kiuj misuzas la francan, estas ankaŭ esperantolingvanoj kiuj misuzas Esperanton. Mi pensas ne pri tiaj okazoj sed pri la kleraj falsantoj, pri la bone edukitaj modifantoj.

Do, mi ĉiam celas la "aŭtoritatojn" de nia organizita movado kaj speciale la Akademion, kiun mi persiste deziras vidi kiel la fonton kaj la forton, kiu povas kaj devas efike protekti la lingvon, metante limojn al la arbitreco de tiaj, vere danĝeraj, modifantoj, de la elstaraj esperantistoj, artikolskribantoj, E-instruantoj, verkistoj, profesoroj, akademianoj, tiuj, kiuj tre ofte, eĉ en la paĝoj de la oficiala organo de U.E.A., per siaj tekstoj atakas la regulecon kaj klarecon de la lingvo.

Estas kelkaj grizaj punktoj en la lingvo, kiuj devas, fare de la Akademio iĝi tute klaraj.

La Akademio povus eldoni broŝuron, aŭ, pli facile, akiri sian propran paĝon en "Esperanto".

De tiu posteno, akademianoj povus pritrakti ĉiun proponon, demandon, komenton, doni solvon al ĉia problemoj, klarigi eventualajn dubojn, kritiki tekstojn, montri la erarojn de "ĉiaranga" artikolskribanto, verkisto k.s.

Motivon por tiu ĉi mia babilado donis denove la legado de la lasta "Esperanto".

Tiele, ankoraŭfoje mi demandas ĉiun respondan aŭskultanton, ĉu de substantiva radiko estas ebla kaj ĝusta la formado de verbo?

Regulo ne ekzistas, tamen laŭ mia propra lingvo-sento tio ne povas esti permesata, ĉar la derivaĵoj ne povas havi klaran, konkretan, senduban signifon.

En tiu ĉi lasta "Esperanto" mi ankoraŭfoje trovis vortojn kiel "diplomi", "kongresi" k.a. kiuj tamen ne montras klare ĉu "oni aljuĝis diplomon" aŭ "oni ricevis diplomon", ĉu "oni partoprenis kongreson" aŭ "organizis kongreson"? Mi, do, demandas min, kial oni devas esprimi sian ideon per nur unu vorto? ĉu estas tiom malfacile, tiom peze diri "aljuĝi diplomon", "partopreni kongreson"?

Se "kongresi" kaj "artikoli" kaj "diplomi" estas tolerataj, ĉu mi povas ankaŭ uzi "lecioni", "universitati", "liturgii",



hospitali”, “hoteli”, “restoracii”?

Mi ie legis la frazon “ĉi-somere mi aŭgustis en Parizo”, do, mi supozas ke mi rajtas diri ke bedaŭrinde mi semajnis en mia hejmo, mi tagis en mia laborĉambro, mi vesperis en la salono, kaj mi noktis sur mia lito.

Ĉu tian Esperanton kreis Zamenhof?

## Kuiru kun mi

### MITULA PIPRAĴO

Hodiaŭ ni kuiras pladon el Napolo, unu el la plej facila por prepari kaj plej bongusta de la itala kuirarto.

#### INGREDIENCOJ (4 personoj)

2 kg da mituloj  
pano por fari krustegojn  
ajlo  
olivoleo  
petroselo  
pipro, salo  
origano

Ni komencas purigi la mitulojn. Ni forigas la mitulojn kun rompita aŭ malferma konko, ni gargaras ilin subakve, ni purigas la mitulojn unuope, kaj ni skrapas la konkon kun la klingo de tranĉilo por forigi la krustojn, ni deigas la barbeton, kaj fine forigas la malpuraĵojn. Ni metas la mitulojn en bovlo de malvarma akvo aŭ kovras ilin per malseka tuko, kaj metas en la fridujo.

Ni preparas krustegojn. Ni tranĉas la tranĉaĵojn de pano kaj kondimentas kun oleo, ajlo kaj origano. Ni metas ilin sur graskoletilo kovrata kun la fornopapero kaj ni lasas toasti ĝin por kelkaj minutoj ĝis ili estas orizitaj.

Nun ni kuiras la mitulojn. Ni metas iom da oleo en



granda poto, ni aldonas la ajlon, tiam ni verŝas la drenitajn mitulojn, kaj ni kovras per kovrilo kaj kuiras ĝis kiam ili ne estos malkaŝitaj.

Ni rotacias la paton por miksi. Kiam la mituloj estos malfermaj, ni kondimentas kun haketita petroselo, pipro kaj ni agitas la kaserolon por saporigi ilin. Ni servas kun la krustegoj.



KUIRU KUN MI  
Receptoj de la tuta mondo

*Bonan apetiton!*

**Fonto:** <https://kuirukunmi.com/2016/05/30/mitula-pipraĵo/>

Vortareto		graskoletilo	yaĝ sŭzdŭren ızgara	petroselo	maydanoz
		haketita	parĉalanmiŝ, kesilmiŝ	pipro	biber
agiti	ajite etmek, sarsmak	kaserolo	tencere	poto	kap
ajlo	sarımsak	klingo	keskin taraf	purigi	temizlemek
barbeto	sakalcık	kondimenti	tatlandırmak	rompita	kırılmış
bongusta	lezzetli		(baharat vs ile)	rotacii	döndürmek, çevirmek
bovlo	derin kap	konko	kabuk, midyenin	salo	tuz
deigi	uzaklaştırmak	krustego	kızartma kabuk	saporigi	lezzetlendirmek
drenita	sŭzdŭrŭlmŭŝ	krusto	kabuk	skrapi	kazımak
forigi	yok etmek, atmak	kuirarto	mutfak sanatı	toasti	tost yapmak
fornopapero	fırın kağıdı	mitulo	midye	tuko	örtü
fridujo	buzdolabı	olivoleo	zeytin yağı	unuope	birer birer
gargari	bol su ile yıkamak	origano	kekik		



### Tekrar merhaba,

Bu ay da olağan kursumuza devam ediyoruz. Kursumuz çok basit bir kitap olan Avustralyalı G.Gladstone

Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı 1934 basımı çok eski bir kitaptan. Her ay bu kitaptan bir ders çalışıyoruz. Bu derslerin sonuna ekler, sözlük ve dilbilgisi ile ilgili kısa tanımları veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın çünkü bu dilbilgisi tanımlarını ya

da açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Hatırlıyorsanız metin içindeki tirelerin ( "-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanıldığını söylemiştik. Bu dersten itibaren basit ekleri (fiil, isim, sıfat vs eklerini) artık ayırmıyoruz, sadece gerçek ön ve arka ekleri ile bileşik kelimeleri ayırıyoruz.

### LA INFANOJ

Ĉiu muso havas longan voston. Ŝila ĉiam portas rubandon sur la vosto. Roĝero kaj Johano ne portas rubandon, ĉar ili estas knaboj.

Roĝero estas sep-jara. Li povas kur-i. Li kuras rapide!

Ŝila estas kvin-jara. Ŝi povas danc-i. Ŝi dancas bone!

Johano estas tre juna. Li estas nur tri-jara.

Li povas salt-i. Li saltas alte!

Iun tagon Ŝila diris al Roĝero, "Kur-u, Roĝero! Kur-u rapide ĉirkaŭ la ĝardeno!"

Roĝero kur-is rapide ĉirkaŭ la ĝardeno.

Tiam Ŝila dir-is al Johano, "Saltu-u, Johano! Salt-u super la rondan tablon!" (Est-is pomo sur la tablo.)

Johano saltis super la rondan tablon.

Tiam la du knaboj dir-is al la fratino, "Danc-u, Ŝila! Danc-u sur la herbo!"

Tiam Ŝila danc-is sur la herbo.

Ho, ŝi dancas bone! Ŝi estas bela mus-et-o<sup>1</sup>.

Tiam la tri infanoj dir-is al la katino, "Kant-u, katino! Kant-u!"

Vi kantas laŭte dum la nokto; kant-u nun!"

Tiam la katino kaj la katido kantis belan kanton.

<sup>1</sup> "et-a" signifas "mal-granda".



### Yeni Kelimeler

alte	yüksek şekilde
botelo	şişe
ĉar	çünkü
ĉirkaŭ	etrafında
danci	dans etmek
dum	boyunca, sırasında
fraŭlino	bayan
glaso	bardak
herbo	otlar, çayır
instru-ist-ino	kadın öğretmen

iun tagon
juna
kajero
korko
krajono
malplena
mus-et-o
nokto
nun
plena
plumo

bir ĝun
genç
defter
mantar, tıpa
kalem
boş
küçük fare
gece
şimdi
dolu
dolma kalem

rapide
rubando
saĝa
salti
sep-jara
signifi
super
tabulo
vosto

hızlı şekilde
kurdele
akıllı
zıplamak, sıçramak
yedi yaşında
anlamında olmak
üzerinden
yazı tahtası
kuyruk

### Yeni Ekler

-et	kelimeye küçüklük anlamını verir
-ist	kelime ankanından meslek adı yaratır

## Kapanış



Bir sayımızın daha sonuna geldik.

Haziran sayımızda sizlere 101. UK, Esperanto-Sumoo, UEA ve TEJO'dan bazı haberler aktardık.

Arkadaşımız Utku Gürdal'ın düzenlediği Esperanto yarışmasının sonucunu bildirdik.

Fransadan arkadaşımız Paule Brunel bize bir okuyucu mektubu gönderdi. Ayrıca neden ve nasıl Esperanto öğrendiğini kaleme alıp bize gönderdi biz de size aktardık.

Size kısa bir sözlük ile birlikte kolay bir okuma parçası olan "Zepo la zebro" yu aktardık.

Brezilya'da 18 bin ağaç diken bir kişinin hikayesini verdik. Esperanto alt yazılı videosu için de link verdik. Videoyu Esperanto altyazılarını seçerek izlerseniz kulağınız için faydası olacaktır.

Sizlere iki fıkra aktardık ve basit bir bulmaca hazırladık.

Şiir köşesinde sizlere Kalman Kalocsay'dan dört adet şiir aktardık. Kalocsay en önemli Esperanto şairlerindedir. Şiirleri okumaya çalışın, çok eğlencelidir Kalocsay'ın şiirleri.

Arkadaşımız Cecile Anda, Norveç'teki Esperanto dergisine hazırladığı Türkiye seyahati ve 9. Ortadoğu Toplantısındaki izlenimlerine dair yazısını bize de

gönderdi, biz de dergimizde yayınladık.

Kısa felsefe tarihi yazı dizimize Epiktetus, Çiçero, ve Seneka, yani "Stoacılar" grubu ile devam ettik.

Genç Detektifler adlı dizi hikayenin ikinci konusunu yayınladık.

Afrika Kongresinden bahsettik, Dünya Aile Günü dolayısı ile UEA'nın yayınladığı mesajı aktardık.

Yunan esperantist Spiros Sarafyan'ın Esperantistler hakkında çok ama çok önemli bir kritiğini Dilbilgisi kısmında aktardık.


Napoliden bir yemek tarifi verdik. Yemek tarifleri kısa ve ilginç yazılar olduğundan, verdiğimiz sözlük ile okumaya çalışırsanız çok faydasını görecekiniz.

Esperanto kursumuza 7. dersi ile devam ettik.

Önemli bir not ve yenilik olarak, bu sayımızda verdiğimiz iki video ve bağlantılarının üzerlerine tıkladığımızda bağlantılar tarayıcınızda açılacaktır. En azından teknik açıdan bunu umuyoruz Ayrıca kaynak belirttiğimiz yerlerdeki tüm bağlantıların ve email adreslerinin de otomatik olarak açılabilmesi için çalışma yaptık.

**Sonraki sayımızda buluşmak üzere, şimdilik Hoşçakalın...**

## Diplomo de la maja Esperanto Sumoo



## Solvo de la Krucvort-Enigmo

					O		O			11
				O	T	K	E	L	E	10
						V	R	O		9
	O		O	N	J	E	V			8
	C		F			I		O		7
	I		I			N		N		6
O	F	O	R	T	S	V	A	T	A	5
	O		R	A			M		R	4
			O	T	A	M	I	L	K	3
			H				L		E	2
							A			1
10	9	8	7	6	5	4	3	2	1	